JULIO 1966 37a Jaro. N-ro 7 (734)

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Asocia sideio de S.A.T., administrejo k redaktejo:
67 avenue Gambetta, Paris 20
Redaktoro: N. Bartelmes, sama adreso.
•
Eldonejo de SENNACIULO:
C. van Essen,
Floretstraat 10, Rotterdam-26

PRI LA ENHAVO DE LA ARTIKOLOJ RESPONDECAS LA AŬTOROJ MEM.

Religiaj kredoj kaj evoluo de l'civilizoj

La legantoj de „Sennacieca Revuo" memoras, ke ni aperigis en la kajero 1962 ekstrakton el la libro de Gustavo Le Bon „La Evoluo de la Popoloj", sub titolo „La rolo de l'ideoj en la vivo de l'popoloj". Nu, ĉi tie ni sekvigas alian ĉapitron el tiu verko, nome pri la rolo de l'religiaj kredoj en la evoluo de la civilizoj. — Red.

Inter la diversaj ideoj, kiuj gvidis la popolojn kaj kiuj estas la lumturoj de la Historio, la polusoj de la civilizo, la religiaj ideoj ludis tro superpezan rolon, kaj tro fundamentan, ol ke ni ne povu dediĉi al ili specialan ĉapitron.

La religiaj kredoj konsistigis ĉiam la unuarangan elementon de la popolara vivo, sekve tiun de ilia historio. La plej konsiderindaj historiaj eventoj, tiuj kiuj havis plej efikan influon, estis la naskiĝo kaj la morto de la dioj. Kun nova religia ideo naskiĝis nova civilizo. En ĉiuj eraoj de la homaro, en la antikveco kiel en la moderna tempo, la bazaj demandoj estis ĉiam demandoj religiaj. Se la homaro perdus siajn diojn, tia evento estus pro siaj konsekvencoj la plej grava el tiuj, kiuj plenumiĝis ĉe la surfaco de nia planedo depost la naskiĝo de la unuaj civilizoj.

Oni ne devas forgesi, efektive, ke depost la aŭroro de l' historiaj tempoj ĉiuj politikaj kaj sociaj institucioj estis fonditaj sur religiaj kredoj, kaj ke, sur la mondscenejo, la dioj ĉiam ludis la unuan rolon. Ekster la amo, kiu ankaŭ estas potenca religio, sed persona kaj transira, la nuraj religiaj kredoj povas agi laŭ tia rapida maniero sur la karakteron. La konkeroj de l' araboj, la krucmilit-iroj. Hispanio sub la inkvizicio, Francio kun la Sankt-Bartolomea buĉado kaj la revoluci-militoj, montras, kio fariĝas popolo hipnotita de siaj ĥimeroj. Ĉi tiuj influadas Anglion dum la puritana epoko, senĉese, tiagrade intense, ke la tuta spirita sinteno per ĝi estas profunde transformata. Certe la homo mem kreis la diojn. Sed kreinte ilin li estis tuj poste sklavigita de ili. Ili ne estas filoj de la timo, kiel pretendas Lukrecio, sed verdire de la espero, kaj tial ilia influo estos eterna.

Kion la dioj donis al la homo, — kaj ili solaj ĝis hodiaŭ povis tion doni al li, — estas spiritostato, kiu enhavas la feliĉon. Neniu filozofio iam sciis realigi tian taskon.

La konsekvenco, se ne la celo de ĉiuj civilizoj, de ĉiuj filozofioj, de ĉiuj religioj, estas krei certajn spiritostatojn. Unuj



NOTTINGHAM. Kasteltereno kun ekvido al la urbo (maldekstre). Swanwick-kongresanoj estos oficiale akceptataj ĉe la Konsilantara Domo.
Kun permeso de „Publicity and Information Dept. City of Nottingham"

implikas la feliĉon, la aliaj ne implikas ĝin. Nia feliĉo dependas sendube de eksteraj cirkonstancoj, sed precipe de la stato de nia animo. La martiroj sur siaj brulŝtiparoj kredis sin verŝajne pli feliĉaj ol iliaj ekzekutistoj. La stratbalaisto formanĝanta kun senzorgeco sian ajlumitan pankruston povas esti senfine pli kontenta ol milionulo, kiun okupas senfinaj zorgoj.

La evoluo de l'civilizo kreis, malfeliĉe, ĉe la moderna homo kvanton da bezonoj, ne donante al li la rimedojn ilin kontentigi, kaj estigas tiele ĝeneralan malkontenton en la animoj. Ĝi estas generanto de l'progreso sendube, sed ĝi generas ankaŭ socialismon kaj anarkismon, tiuj timindaj esprimoj de l'malespero de la amasoj, kiujn neniu kredo plu subtenas [1]). Komparu la malkvietan, febrecan, pri sia sorto malkontentan eŭropanon kun la orientano, ĉiam feliĉa pri sia destino [2]). En kio ili diferencas, se ne en la stato de ilia animo? Oni estas transforminta popolon, kiam oni transformis ĝian manieron koncepti kaj, sekve de tio, pensi kaj agi.

Krei spiritostaton, kiu feliĉigas la homon, jen kion socio antaŭ ĉio devas serĉi, se ĝi volas pluekzisti longan tempon. Ĉiuj ĝis nun fonditaj socioj havis kiel subtenilon idealon kapablan venke submeti la animojn, kaj ili ĉiam forvelkis, de kiam tiu ĉi idealo ĉesis subjugigi ilin.

Unu el la grandaj eraroj de l'moderna epoko estas kredi, ke nur la eksteraj aferoj entenas la feliĉon. Ĝi nestas en ni mem, kreiĝas per ni mem kaj preskaŭ neniam ekster ni. Rompinte la idealojn de l'antaŭuloj, ni konstatas hodiaŭ, ke estas tre malfacile vivi sen ili, kaj ke, je risko malaperi, necesas trovi la sekreton anstataŭigi ilin.

La veraj bonfarintoj de la homaro, tiuj kiuj meritus el la dankemaj popoloj gigantajn orstatuojn, estas tiuj potencaj magiistoj, ideal-kreantoj, kiujn la homaro iafoje produktas, sed vere malofte. Super la torentego de vanaj aperaĵoj, solaj realaĵoj kiujn ni povis ekkoni, super la rigida kaj glacia meĥanikigo de l'mondo, ili kreskigis potencajn kaj pacigajn ĥimerojn. kiuj kaŝas al la homo la mallumajn flankojn de ĝia destino, kaj kreas al li la ensorĉitajn restadejojn de espero kaj sonĝo.

Se oni konsideras ekskluzive la politikan vidpunkton, oni konstatas, ke ankaŭ tie la influo de l'religiaj kredoj estas grandega. Ilia nerezistebla forto konsistas en tio, ke ili formas la unikan faktoron povanta momente doni al popolo ab-

PERSONECO KAJ SOCIALISMO

La plej konata pola filozofo, prof. Adamo Schaff, postulis antaŭ nelonge, ke pri „neklaraj aferoj oni skribu kiel eble plej klare"; kaj laŭ Ŝopenhaŭer nur tiu filozofia artikolo estas bona, kiun povas kompreni eĉ „ĉiu simpla lavistino."

Se ni provas apliki tiun principon al la demando, kiun rolon ludas la personeco en la historio de la Socialismo, ni devas unue konstati, ke burĝismaj kritikistoj intencas malklarigi la problemon, por malkreditigi la socialismon. Ili intermiksis du specojn de materialismo kaj estigis konfuzon. La marksa materialismo havas nenion komunan kun la ecoj de la fizika aŭ ĥemia materio; do ĝi ne estas senspirita aŭ malhomeca. Marksistoj ne estas krudaj materialistoj. Ĉe Marks signifas „materia" plej ofte „ekonomia" kaj ne „substanca", tiel ke „materia" kaj „ekonomia" estas kvazaŭ sinonimoj. Ekonomio ne estas io utopia, sed celkonscia agado de homoj kaj ties rezulto. Marks diris klare: „Produktivaj cirkonstancoj estas tiaj, kiujn la homoj rezultigas en sia socia vivoprocezo, por formi la socian vivon." Do produktcirkonstancoj estas homaj cirkonstancoj.

La sufiĉe stranga stilo de Marks estas klarigebla el la tiamaj klopodoj ĉion esprimi ner nocioj de la filozofo Hegel. Marks uzis la esprimon „materialismo" ankaŭ pro tio, ĉar tiutempe ĝi havis bonan prestiĝon. Laŭ la nuna lingvuzo ĝi ne plu estas trafa, eĉ erariga. Tial ni ne devas gluiĝi al tiu plursignifa vorto. Se oni subkomprenas la koncernajn nociojn, ni povus konstati paradokse: La marksa materialismo ne estas materialismo, sed ekonomia, sekve homa afero.

„Historia materialismo" ne signifas, ke la historio estas la produkto de la materio. En historio okazas esence, kion homoj efektivigas; la homa volo ŝanĝas la jam ekzistantajn ekonomiajn cirkonstancojn. „Homoj faras la historion laŭ la kaŭzoj de jam ekzistantaj kondiĉoj." (Sartre) — En historio manifestiĝas sukcesoj kaj malsukcesoj de homaj spiritoj kaj manoj. Neniu supermonda spirito povas direkti de ekstere la homan historion. Jakobo Burckhardt instruis, ke ne ekzistas ia ajn ekkonebla senco en la historio. Ĉu la historio havas sencon, tio dependas de la **homoj.** Do super la enirpordo al marksismo ne staras la frazo: „La materio regas", sed pli ĝuste: „La racia homo regas." La teorio de la historia materialismo estas identa kun la marksisma humanismo.

La homoj servas unue al siaj materiaj bezonoj kaj kreas al si la ideologiojn, kiuj utilas al la klopodoj ŝanĝi malbonajn cirkonstancojn. Ekzistas objektivaj kaj subjektivaj faktoroj en la historio. La objektivaj estas la jam ekzistantaj sociaj cirkonstancoj; ili estas la antaŭkondiĉoj por la subjektivaj faktoroj, la homaj fortoj. Sartre diris, ke ekzistas certaj historiaj necesoj, kiujn la cirkonstancoj trudas al la homoj kaj tiuj estas por li kvazaŭ leĝoj. De la historiaj kondiĉoj dependas multrilate sentado kaj pensado de la homoj. — Tiu teorio estas nun tiel ĝenerale rekonita kaj akceptita, ke oni tute forgesas, ke estis Karlo Marks, kiu starigis ĝin.

Pensado kaj agadoj de la homoj estas determinitaj de la ekonomio, sed ne tute kaj ne aŭtomate. La teorio klarigas, ke por la agoj de la homoj ekzistas certaj sociaj, ekonomiaj objektivaj necesoj. kiujn la homoj ofte ne povas malatenti sen malbonaj konsekvencoj. Karakteraj ecoj kaj talentoj de la personeco estas nur tie kaj tiam produktivaj, kie kaj kiam la sociaj rilatoj tion permesas. La homo povas manifesti siajn intencojn, se li havas favoran pozicion en la socio. La ĝeneralaj historiaj cirkonstancoj estas ofte pli fortaj ol la volo de politikistoj aŭ ŝtatistoj, sed tiu sperto ne devas konduki al rezignacio aŭ fatalismo. Eĉ grandaj historiaj personecoj sentis forte la determinecon de histo-

---

solutan interes-komunecon kaj tian de sentoj kaj pensoj. La religia spirito tiel anstataŭas per unu frapo tiujn malrapidajn heredajn akumulaĵojn, necesajn por formi la animon de nacio. La popolo, kiu estas subjugita de kredo, sendube ne ŝanĝas mensostaton, sed ĉiuj kapabloj estas turnitaj direkte al sama celo: la triumfo de ĝia kredo, kaj, pro tiu sola fakto, ĝia potenco fariĝas giganta. Dum la kred-epokoj la popoloj, momente transformitaj, plenumas tiujn mirindajn fortostreĉojn, tiujn fondojn de imperioj kiuj mirigas la historion. Tiel kelkaj arabaj triboj, unuigitaj per la penso de Mahometo, konkeris dum malmultaj jaroj naciojn, kiuj eĉ ne estis aŭdintaj pri ilia nomo, kaj fondis vastegan imperion.

Oni ne devas konsideri la kvaliton de la kredoj, sed la gradon de superregado kiun ili havas sur la animojn. Ne gravas ĉu la alvokita dio estas Moloĥo aŭ ĉia alia diaĵo ankoraŭ pli barbara. Kelkfoje ĝia prestiĝo eĉ dependas de ĝia netoleremo kaj de ĝia barbareco. La tro toleremaj kaj tro mildaj dioj ne havigas potencon al siaj adorantoj. La sektanoj de l'rigida Mahometo regis longan tempon super granda parto de la mondo kaj estas ankoraŭ timindaj; tiuj de l'pacama Budao neniam fondis ion transdaŭran kaj estas jam forgesitaj de la historio.

La religia spirito do ludis ĉefan rolon politikan en la ekzisto de la popoloj, ĉar ĝi estis ĉiam la sola faktoro kapabla agi rapide sur aliajn karakterojn. Sendube la dioj ne estas senmortaj, sed la religia spirito estas eterna. Por kelka tempo endormigita, ĝi vekiĝas ekde kiam nova diaĵo estas kreita. Ĝi permesis al Francio, antaŭ unu jarcento, venke kontraŭstari Eŭropon batal-armitan. La mondo vidis ankoraŭ unu fojon, kion kapablas la religiema spirito; ĉar tio estis vere nova religio, kiu tiam fondiĝis, animanta per sia spiro tutan popolon. La diaĵoj eknaskiĝantaj estis sendube tro rompiĝemaj por povi daŭri; sed tiel longe kiel ili daŭradis, ili havis absolutan influon sur la mensojn.

La povo transformi la animojn, kiujn la religioj posedas, estas cetere sufiĉe efemera. Malofte la kredoj sin konservas dum iom longa tempo je tiu grado de intenseco, kiu komplete transformas la karakteron. La revo komencas paliĝi, la hipnotito vekiĝas iom, kaj la malnova baza fundo de l'karaktero reaperas.

Kaj eĉ kiam tutpovaj estas la kredoj, la nacia karaktero rekoniĝas ĉiam laŭ la maniero, kiel tiuj kredoj estas akceptitaj, kaj laŭ la manifestacioj, kiujn ili provokas. Vidu la saman kredon en Britio, en Hispanio kaj en Francio: kiaj diferencoj! Ĉu la Reformacio iam estus ebla en Hispanio, kaj ĉu Anglio iam estus submetebla al la terura jugo de la inkvizicio? Ĉu oni ĉe la popoloj, kiuj akceptis la Reformacion, ne facile perceptas la fundamentajn karakterojn de la rasoj, kiuj, malgraŭ la hipnotado de l'kredoj, konservis la apartajn trajtojn de sia mensostato: la sendependeco, energio, kutimo rezonadi kaj ne toleri la leĝon de la mastro?

La politika, arta kaj literatura historio de l'popoloj estas ido de iliaj kredoj; sed tiuj lastaj, kvankam ili modifas la karakteron, trovas sin egale profunde modifitaj de tiu ĉi. La karaktero de popolo kaj ĝiaj kredoj estas la ŝlosiloj de ĝia destino. La unua estas, en siaj bazaj elementoj, nevariebla, kaj ĝuste ĉar ĝi ne varias, la historio de popolo konservas ĉiam certan unuecon. La kredoj povas varii, kaj ĝuste ĉar ili varias, la historio registras tiom da revolucioj...

...Se hodiaŭ la malnova socio ŝanceliĝas sur siaj bazoj kaj vidas ĉiujn siajn instituciojn profunde ŝanceliĝantaj, tio signifas ke ĝi perdas pli kaj pli la malnovajn kredojn, pere de kiuj ĝi vivis ĝis nun. Kiam ĝi estos perdinta ilin komplete, nova civilizo, fondita sur nova kredo, nepre okupos ilian lokon. La historio montras al ni, ke la popoloj ne longe postvivas la malaperon de siaj dioj. La civilizoj naskitaj sub ilia influo mortas same kun ili. Nenio estas tiel ruiniga kiel la polvo de l'mortintaj dioj.

Traduko de N.B.

---

(1) En la fino de la 19-a jarcento, kiam la aùtoro verkis tiun ĉi libron, efektive en eùropaj ŝtatoj, kaj precipe en Francio, kie loĝis la verkinto, socialistaj kaj anarkistaj ideoj torente disvastiĝis, kaj la tiama burĝaro, — inter ili nia aùtoro — timegis la kreskantan ondon de la revoluciemaj mizeruloj, kiujn subtenis alte talentitaj intelektuloj kaj kies organiizoj akiris ĉiam pli grandan potencon. Se ni publikigas tiujn liniojn de historiisto-filozofo G. Le Bon, ni faras tion ĉar lia analizado estas klara kaj nepre instrua. Sed liaj okulvitroj estas nebuligitaj pro la tiam superreganta naciismo: li distinge diferencigas la „apartajn kvalitojn" de l'unuopaj popoloj; efektive tiutempe nur en la socialista kaj anarkista medio oni trovis rarulojn, kiuj antaŭvidis la unuigitan homaron kaj predikis universalismon. — *Red.*

(2) Oni komparu kun tiu pritakso la hodiaŭan orientanon, kiu en multaj regionoj emancipiĝis, preskaŭ tute, el tiu stato de pasiveco, kiu katenis lin dum miloj da jaroj. Efektive ne ĉie! — *Red.*

riaj faktoj. Tiel Bismarck sin konsideris kvazaŭ simpla ilo de la historia evoluo. Ekzistas kelkaj tiurilataj eldiroj liaj, ekz.: „Ni ne povas ignori la pasintan historion, ni ankaŭ ne povas fari la estonton. — Mia influo al la okazaĵoj, kiuj subportis min, estas esence supertaksata. La historion ni ne povas fari, ni povas nur atendi, ke ĝi okazos." Ĉu tio ne estas plena determineco? Sed ĉe Marks la personeca elemento en la historio estas multe pli forta. La socio komisias al politikaj gvidantoj konvenajn taskojn, kiujn ili povas plenumi, kiam ekzistas favoraj objektivaj kondiĉoj. ,

Historio pruvas, ke la personeca influo povas esti tre konsiderinda. Ĉu ekzistas historia determineco? Jes! Sed ne aŭtomata. Ne ĉiuj decidoj kaj agoj estas determinitaj. Ĉi tie estas okazo demandi pri la libereco de la homa volo. Ĉu la determineco estas tiel nepriga, ke la volo estas tute paralizita? La aserto, ke Marks intencis elimini la volon el la historio, estas absurda. La homoj ja ne estas senvolaj kaj senfortaj rilate al la sociaj cirkonstancoj, sed sukcesas plibonigi ilin favore laŭ la bezonoj. Kiu rezignacias kaj ne agas, tiu malutilas al si mem kaj al la socio. Se sociaj cirkonstancoj laŭ alta grado limigas la volon, tiam objektive tute plena libereco ne ekzistas. Homoj ne estas ĉiopovaj, ili ne povas manipuli la historion en ĉiuj rilatoj. La volo povas fortigi la socion, montri al ĝi la ĝustajn vojojn kaj konvenajn rimedojn. Socialismo ne estiĝas per si mem, sed nur per la insista, celkonscia agado de socialistoj. En multaj okazoj ni ne havas la individuan eblon agi laŭvole. En tiu psika stato troviĝis Luther, kiam li diris en Worms: „Ĉi tie mi staras, mi ne povas agi aliel." La teorio de la historia materialismo provas klarigi, kial la homoj agas tiel kaj ne aliel. Ofte ne ekzistas alternativo. La historio montras, ke homoj, kiuj estas konsciaj pri tiu objektiva neceseco, kun granda volforto kaj persisto povas venki la plej ĝenajn malhelpaĵojn. Ili ne sentas sin malliberaj, sed liberaj por plenumi la farendajn taskojn, kaj tio signifas efektive personan liberecon de la volo. Do la volo de la homoj estas libera en la kadro de historiaj kondiĉoj kaj necesoj.

La plej grava kaj decida problemo estas la ekkono de la ĝenerala direkto de la socia evoluo. La historiaj faktoj estas kunligitaj kiel ĉeneroj laŭ la principo de kaŭzo kaj efiko. Se ni konscias, ke niaj agoj estas la plej dezirindaj inter ĉiuj eblaj, tiam ni agas des pli energie. Eĉ Bismarck obeis ja la historiajn leĝojn. Sukcesaj homoj laboras en la direkto, en kiu evoluas la socio, ĉar tiu direkto influas kaj kondiĉas la homajn fortojn. La historia sperto montras, ke la fortoj de la socio venkas, se ili agas laŭ la ĝusta direkto, en akordo kun la evoluo. Ni havas la kapablon kaj eblecon ekkoni la iradon de la historio. La tre grava ekkono, ke la historia procezo estas necesa, neevitebla kaj efektivigebla per konvenaj rimedoj en ĝusta tempo, estas garantio por sukceso. La socialistoj konscias, ke la kapitalismo arkaikiĝis kaj ke la homaro nepre fariĝos socialista, ĉar tio estas historia neceso, do kvazaŭ leĝo por la socialistoj. Ili ne povas imagi, ke konsciaj socialistoj fariĝos kapitalistoj kaj ke la kapitalismo iam regos sur la tuta tero. Pro tio la socialistoj sentas eĉ la moralan devon labori tiudirekte, eĉ la pasian volon dediĉi al tiu tasko sian vivon.

Neniu homo povas trudi al la socio por la daŭro iun staton, kiu ne estas racia. Ne estas eble rekonduki la ekonomion al la formo de feŭdismo. Tion pruvis modernaj diktatoroj. Nur malprudentaj homoj agas kontraŭ la direkto de la evoluo kaj devas fiaski. Kompreneble la evoluo al socialismo alarmas kaj furiozigas la kapitalistojn, kaj ili provas elsputi tiun oston en sia gorĝo kiel eble plej baldaŭ; ili reagas perforte kaj kaŭzas ĉiam novajn imperiistajn militojn.

Grandaj homoj per siaj talentoj kaj sia rango en la socio povas influi la evoluon eĉ laŭ konsiderinda grado. Sed ankaŭ por ni ordinaruloj stariĝas historiaj taskoj, ĉar en demokratio ni ĉiuj estas respondecaj. La taskoj de grandaj homoj estu ankaŭ niaj taskoj. Do ĉiu homo, kiu partoprenas en grava paca batalo por la socio, povas sin senti granda en individua senco. Al ni ĉiuj la vojo estas ebenigita.

La historio elmontras, ke la verkoj de niaj grandaj socialistaj pensuloj estis dependaj de sociaj kondiĉoj. Karlo Marks konceptis siajn teoriojn, kiam subpremita proletaro bezonis liajn instruojn. Dank' al siaj sciencaj ekonomiaj konoj li povis rigardi pli malproksimen ol aliaj homoj en la direkto de la historia procezo, esplorante senĉese la regantan faktoron en tiu evoluo, la socialismon. Tiu antaŭvido helpe de sciencaj metodoj estas la antaŭkondiĉo por teoria planado kaj por unuaj paŝoj de la futurologio. Aliel Marks ne estus povinta skui la burĝan mondon kaj ŝanĝi la tutan mondpolitikon. Tiel Frederiko Engels povis antaŭdiri, jam en la jaro 1888: „Por Prusio-Germanio estas plu ebla nenia alia milito ol mondmilito, kaj tia de ĝis nun ne imagebla vasteco kaj furiozo. Ok ĝis dek milionoj da soldatoj sin sufokmortigos reciproke. — Malsatmizero, epidemioj, ĝenerala konfuzo de la militistaro kaj de la popolo, kaŭzita de la akuta mizero. — Disfalo de la malnovaj ŝtatoj kaj de ilia tradicia ŝtatfilozofio, tiel ke la kronoj ruliĝos po dekduoj sur la pavimon, kaj neniu penos kapti ilin." Tia prognozo, ĝusta eĉ laŭ detaloj, estas ebla nur ĉe scienca konsidero de la evoludirekto. „Filozofio konstituiĝas por esprimi la ĝeneralan evoluon de la socio." (Sartre) — Se Marks estus vivinta en la tempo de Zamenhof, lia alvoko certe tekstus: „Socialistoj el ĉiuj landoj, unuiĝu per Esperanto!" Ankaŭ Eŭgeno Lanti ekagis en la direkto de necesaj evoluoj. Per vere genia inspiro li ricevis la konvinkon, ke mondpaco kaj socialismo povas esti efektivigotaj, se ni rezignas pri nacieca pensado. Eklumis en li la ideo de l' sennacieca solvo por gravaj mondproblemoj. Liaj samcelanoj, la sennaciuloj, heredis de li la rokfirman konvinkon, ke Esperanto kaj mondpaco estas interkondiĉaj. Kiam SAT-anoj kunvenas, leviĝas el iliaj junecaj koroj la kantoj de la mondlaboristaro, ili protestas kontraŭ vetarmado kaj imperiistaj militoj. El iliaj okuloj brilas fajreroj de la lantiisma entuziasmo; ili scias, ke ili agitas en la ĝusta direkto, kaj ili vidas jam en siaj animoj la lumstriojn de paca epoko de Socialismo, kiu kreos la novan homon.

Riĥter (30.961)

La almozulo

(La poeto estas inter la grandaj poetoj de Nederlando, vivanta en Amsterdamo. Pro personaj spertoj aŭ pro kulturaj motivoj li esprimas sian naŭzon pri la nuna burĝa kulturo.)

Ne ordonu min al via manĝ-festeno,
Arĝento fremda kaj kristalo-helo;
Ne ombru belon de ĉifon-fadeno
Purpurefale via vant-mantelo.

Rostaĵo ne por mi okul-blindiga,
Vapore vanta, sub kristalaj steloj,
Por mi la vino estos ne freŝiga
El ŝlime kotaj kaj mucidaj keloj.

Al mi subejo nigra kaj intima
Sub peza trabo, fulga mole-putra,
Sur plado brune kreva, tuŝo-tima
La simpla manĝo, por laculo nutra.

Post sia tagotask' servistoj viaj
Min aŭskultante ĉe la fajro staras,
Mi funde, sen ĝenvekaj vortoj miaj
Iliajn nokt-misterojn klaraj faras.

Reforta mia korpo, mi ne restos,
Foriros mi dum la vespero ruĝa.
Mi ne fremdulo al la nokto estas,
*Ŝi *) portos min al horizonto fuĝa.*

J. C. Bloem
(el la nederl. *S. Aarse)*

(*) *La nokto* estas inseksa en multaj lingvoj.

Por la Asocia sidejo

Jen nova listo de donacoj ricevitaj por tiu ĉi kolekto! Kun iom da fortostreĉo ni certe baldaŭ atingos la celon fiksitan, nome 40.000 francaj frankoj. Klopodu! Ni kore dankas al la kontribuintoj!
1. junio 1966.

P.K. de SAT

DEK-SEPA LISTO

(Ĉiuj sumoj estas esprimitaj en francaj fk)
— Cl. Bournazel 13.-, Hübner (5 mk) 6.07, Feneyrol 8.50, Memore K.E.9.82, Marble (5 $) 24.50, = 61.89
— (listo Rogers) *ŝil.* Wheatley 10/-, Aldworth 2/6, Ovenell 2/6, Payne £ 1/8/0, Rockey 17/0, Rogers 8/6, Barasi 10/0, Thompson 7/6, Romania 7/6 (£ 4-13-6) = 64.47
— (listo Jankowski) *gm.* Borngässer 1.20, Kriedel 6.20 (gm 7.40) = 9.10.
Sumo de la 17-a listo .... Fr 135,46
Sumo de la listoj 1 - 16 ...... Fr 38.400,22

Kune: Fr 38.535.68



Ĉu ni celas formikejon?

Hazardo vere estas potenco: mia korespond-amiko el Nederlando sendis al mi naskiĝdat-revenan donacon; kaj kiel „remburaĵon" por paketeto li uzis malnovajn ekzemplerojn de ...... „Sennaciulo". Se tio ne okazus, mi neniam sciiĝus pri ekzisto de tiom brila kaj perfekta E-ĵurnalo. Ni (poloj) ne abonas E-gazetaron pro konataj malfacilaĵoj; eĉ UEA-revuon antaŭpagas al mi mia alkmaara amiko.

Sekve — dank' al „providenco"(?!) — mi ricevis la novembran n-ron 1965 de „S-ulo", kies front-artikolo „Sennaciecaj aspektoj" (de red. N. Bartelmes) ege impresis min. Post trifoja tralego mi repensadas pri larĝspirita kamarado Lanti, pri sennacieco, esperanto kaj universo, — problemoj firme interligitaj.

Mi substrekas, ke mi estas nek sociologo, nek psikologo, nek ekonomiisto, nek — entute — sciencisto; neniel eminenta, elstara; en nia socio mi havas absolute nenian gravon. Sed mi estas esperantistino, ne nur laŭ lingvokono kaj uzo, ankaŭ laŭ aspiroj, deziroj, ideoj, kredo, konvinko. Sekve ĉiu homo estas mia frato, ĉiu terangulo posedas mian respekton, estimon kaj amon, samkiel mia propra hejmlando, prapatrejo, kie mi kaj miaj prauloj naskiĝis, vivis, (mortis). Ĉi tiun landon mi tenas plej kara. Do, ŝovinismo, nur iom kamuflita? Ne, centoble — ne. Mi nur opinias, ke sennaciismo kaj sennacieco ne povas plene realiĝi, pro simpla kaŭzo: homoj estas homoj, ne formikoj; ĉiu el ni vivas, certe, por la aliaj, sed antaŭ ĉio por si mem! Homo naskiĝas en familio — jen la plej grava kondiĉo por normale evolui fizike, psike kaj mense. Tute ne imagebla estas iu „senfamilieco". Krome, homo deziras iun ankaŭan apogon similan al tiu familia. Se ies familio estas ĉiu familio en la mondo — tiu ĉi ulo estas do absolute orfa. Kaj tiam li havas apenaŭ „surogaton" (anstataŭaĵon) — socio al li pli proksima, konata kaj kara, ol iuj aliaj en la mondo. Tio ŝajnas al mi tute natura; mi tamen povas erari, neniu estas devigata samopinii.

La mondo estas vastega, kaj — ĝuste pro ekzisto de diversaj popoloj, nacioj, landoj — pitoreska, multkolora, multforma, kvazaŭ iu rava mozaiko. Tio, ne io alia, logas teranojn vojaĝi, tratretadi la terglobon, rigardi ion unikan, malsaman, neegalan.

Sennacieco, se ĝi entute estas ebla ne nur teorie sed ankaŭ fakte, reale, fizike, — nuligus ĉiujn diferencojn. Do, ĉiuj ĉie en la mondo idente vivus, vestiĝus, forigus kutimojn, tradiciojn ktp. Unu eksnaciano estos simila al la alia, kvazaŭ unu akvoguto al tiu apuda...... Ĉu ne tro tede? Ĉu ne kaptus nin mortiga naŭzo? Ja ĝuste vario de ĉirkaŭuloj kaj ĉirkaŭaĵoj estas la necesa kondiĉo por ripoza malstreĉiĝo!

Ĉie la samaj pensoj, vortoj, agoj, celoj, — la sama vidaĵo, la identaj homoj, socioj? Do — formikejo! Tion mi malŝatas. Mi ekzemple arde amas mian prapatrejon; neniam mi tamen eĉ plej profunde pripense aspiradus Ĝin pliriĉigi sur ruinoj de patrolando de alia kunhomo. Ni, esperantistoj, estas ideala pruvo, ke mondo kaj homaro povas esti multkolora mozaiko, estas samtempe unu Granda Rondo Familia.

Ĉio kion mi skribis supre, absolute ne signifas, tamen, ke mi malakceptas kaj forĵetas la grandegan ideon kaj vere genian penson de Lanti. Mi ne estus centprocenta esperantisto, se mi ne ekkomprenus la tiel savan ideon. Demando estas nur, ĉu sennacieco vere kaj fakte feliĉigus la homaron. Mi ne konsentas, ke „nian tutan mondordon regas Ekonomio, ĝiaj baraktoj kaj antagonismoj". Krom la stomako ni, homoj, havas ankaŭ spiriton, koron, tion, kion oni titolis „animo". Sopiro kaj amo, dezirego je memfeliĉo pli regas nian mondon ol Ekonomio. Mi bone konas multajn bonstatajn, eĉ bonegstatajn homojn, — sed preskaŭ neniu el ili estas feliĉa.

Ne homan naciecon oni nepre devas ŝanĝi (aŭ nuligi) por progresigi kaj feliĉigi la homaron. Al neniu malhelpus nacieco, se koncerna naciano estus individuo pensema, nobla, honesta, fratiĝema. Laŭ mia opinio religioj estas por la homaro pli granda malbono ol naciecoj. Religioj kaŭzis militojn, kaŭzis la plej aĉan makulon sur la honoro de religianoj — Inkvizicion; religioj interkvereligas ne nur naciojn, ne nur samnacianojn, sed ankaŭ samfamilianojn. Religio naskas fanatikecon. Oni povas riproĉi, ke samgrade naciismo naskas ŝovinismon. Jes, fakte. Patriotismo tamen ne estas la Granda Mensogo, kiel religio. Lupo amas sian arbaron, akvobirdo sian naskiĝlagon, eta muso sian truon. Tiu ĉi amo estas unusola nefalsa REVELACIO; naskiĝas samtempe kun ĉiu vivanta estaĵo — kaj multege da tempo kaj penado oni bezonus por elŝiri la naturan leĝon el sango de vivantoj. Ĉu vere tio estas necesa? Senhavigi homon de ĉiuj „sanktaĵoj"?

Kiel vi opinias, gekamaradoj?

Maria A. Hessel

Respondo: Ĉar M. A. H. komentas kaj analizas mian artikolon „Sennaciecaj Aspektoj", mi unuavice nur tute koncize klarigu al ŝi iujn miskomprenojn esprimiĝantajn en ŝia bone pripensita skribaĵo:

1.) Venko de sennacieco neniel signifas uniformigon de la homaro, en la penso de Lanti kaj liaj adeptoj! Sennaciemaj homoj nek postulas nek akcelas konscie forviŝon de eksteraj signoj diferencaj en la diversaj horzonoj de la tero. Ili ne aspiras monotonecon nek absolutan egalecon en aspektoj (kio cetere estus neebla jam pro nuraj klimataj diferencoj!). Tiurilate la timo de l' skribantino do estas nemotivita.

2) Mi samopinias, ke amo al propra hejmregiono ne nepriġas militeman spiriton; aliaj ekscitiloj (gazetaro ktp.) zorgas pri kreo de la milit-spirito. M. A. H. kredu, ke konstanta uzado de Esp. kiel universala lingvo, vojaĝoj tra la mondo, kontakto kun alilandanoj, kun fremdaj moroj kaj kutimoj, modifas koncepton pri patriotismo-naciismo. Sennaciemaj homoj ne celas formikejon, sed komunloĝejon por la tuta homaro, en kiu la regulo estas respekto al la kunhomoj de kiu ajn haŭtkoloro, kaj en kiu oni rifuzas respekton al nacia standardo kaj naciaj tradicioj, al kiuj oni „dankas" ĉiujn milit-eksplodojn de la moderna epoko (religiaj militoj kuŝas en pasinta histori-epoko). Vi prave kondamnas la religiojn kun iliaj militoj. Sed, — kredu, — la nuntempa Naciismo estas la plej danĝera religio de la moderna homaro!......

N. Bartelmes

★

Pri „Historia Jesuo Kristo?"

Ni ricevis longan respondon, kritikanta la starpunkton de K-do Riĥter en lia artikolo supratitola (en la aprila n° de „S-ulo"). Jen kion esence, resumite eldiras K-do Marcetta:

Por moderna religiulo, kiel mi mem, Dio kaj Naturo estas ekvivalentaj sinonimoj: Li (aŭ Ĝi) vivas en ĉiu ĉelo, en ĉiu atomkerno, en ĉiu homo.

Fakte tiu unua kristo, kiu estis efektive ne tre diferenca de miloj da aliaj kuraĝuloj luktintaj kontraŭ la malbonaĵoj, estis la plej vitala semeto de Bono en la historio... Ne gravas, ĉu li, siavice, nutris sin per semeroj ankaŭ de aliaj spiritaj geniuloj, kiujn Naturo kutimas veki, oportune, de tempo al tempo, tie kaj ĉi tie, inter la homoj, kiel la reĝinoj inter la abeloj......

......Tute ne gravas ke mi havu Lian imagon aŭ precizan historion de Li sur la papero! Mi imagas Lin multe pli klare en mia koro kaj en mia cerbo... Kompreneble, kiel ĉiu historia romano, ankaŭ la Skriboj pri Kristo povas havi kelkan pleonasman ekzalton de la heroeca figuro kaj de la kapabloj (tiuj sendube eksterordinaraj!) de Kristo... Li instruas al ĉiu individuo, en ĉiu lia respektiva specifa stato, ludi kun amo kaj ofero, se tio necesas, heroece, sian ĝustan naturan rolon, kiel „mikroskopa ĉelo" interne de la kolosa homara „korpo" ĉar Kristo estas kun sia Vivo en ĉiuj ni, homoj de bona volo...

M. Marcetta (29.767), Bergamo

Et-insignoj ree haveblaj !

La et-insignoj, sur kravatpinglo aŭ por butontruo, verd-blankaj, estas ree haveblaj ĉe ni. La prezo por tiu insigno, kaj ankaŭ de nun prezo por *ĉiuj aliaj* insignoj, SAT aŭ neŭtralaj, estas *0,40 $*. Bonv. atenti okaze de mendo. Alkalkulu 10% por afranko.

ESPERANTO

39a SAT KONGRESO
SWANWICK DERBYSHIRE BRITIO
JULIO 23-30
1966

LASTA KOMUNIKO

Adreso de la O.K.K.: 27 Argyle Road, Cranbrook, **Ilford,** Essex, Britio.

Kotizoj:

	us.$
SAT-anoj	3.50
SAT-geedzoj	5.70
Junaj SAT-anoj 15-20	2.50
Gastoj	4.50
Junaj gastoj 15-20	3.50
Subtenanto	2.00

Infanoj sub 15 jaroj: neniu kotizo.

Ne necesas antaŭpagi la loĝadon.

La konferencejo estos plena dum nia kongresa semajno, tamen ne tro...... ni faros nian eblon por kontentigi lastminutajn petojn, sed ni vokas al ĉiuj plej frue resendi la slipojn senditajn kun la maja Cirkulero, por ke OKK estu plene informita kaj kiom eble plej glate organizos ĉion. — OKK nepre ne respondecos pri loĝado survoja, se oni ne jam anoncis la bezonojn.

Bonan vojaĝon al ĉiuj! *O.K.K.*

Naŭa listo de Aliĝintoj

(ĝis 6. junio)

311. Patrick Menossi, 312. k-ino Méchin, 313. ino Evesque, 314. J. J. Bonmarty (ĉiuj Francio); 315. P. Heinrich, 316. ino Napierala, 317. Bühler (ĉiuj Germanio); 318. ino Tissot, 319-20. inoj M. kaj M. Boucard, 321. ino Boularne, 322. M. Allemane (ĉiuj Francio); ino Sotošek (Jugosl.); 324. ino Sörensen (subt.), 325 M. Jacobsen (subt.) (Danio): 326. M. de Vries (Nederl.); 327. S. Hill (Britio).

Propono al la Kongreso

La Kongreso elektu komisionon, kiu esploru ĉu eblas eldoni **diskon** en esperanto kun registrado de laborist-tendencaj kantoj. Tia disko sendube helpus diskonigi kaj valorigi nian Asocion.

T. Burnelle (17.768)

Faktoj kaj komentoj

El Meksikio.

Cirkonstancojn kiel en la ŝton-epoko malkovris usonaj ĵurnalistoj dum vojaĝo en la Guerrero-montaron enloĝatan de la Miksteko-indianoj, ne malproksime de la luksa meksika banloko Akapulko.

En mizeraj unuĉambraj kabanoj pajlotegitaj kunvivas ofte ĝis 20 Mikstekoj ĉiuaĝaj kun porkoj kaj kokoj. „Pli terura ol la Infero de Dante", komentis ĵurnalisto vidante dekdujaran knabinon, kiu prezentis sian sinon al sia malgranda frato, ĉar la mamoj de la patrino jam delonge estis malplenaj. Kaj la infaneto, malgrasiĝinta ĝis skeleto, suĉe kroĉiĝis al la haŭtfaldoj de sia fratino por vivdaŭri.

Tiu ĉi dekdujara knabino estas unu el la malmultaj tiuaĝulinoj, kiujn oni renkontas en tiu ĉi mizera regiono. La plej multaj infanoj estas jam tre frue vendataj de siaj senesperaj gepatroj — al blankhaŭtaj kaj koloraj urbanoj. Viroj aĉetas malgrandan knabinojn por sia plezuro, kaj virinoj akiras tiujn infanojn kiel malmultekostajn servistojn, kiuj ŝajnas la plej feliĉaj homoj de l' mondo havante kiel kompenson nutradon kaj loĝadon. La prezo: junaj knabinoj plej ofte ne kostas pli ol unu dolaron kaj duonon.

„Ni devas forvendi niajn infanojn", deklaris 30-jara patro, kiu aspektis kvazaŭ 70, „por ke ili manĝu iom pli bone kaj ni ricevu monon por maizo, per kiu ni povas nutri la reston de la familio." Ĉar tortillas, plataj maizkukoj, estas plej ofte dum jaroj la sola nutraĵo. Kaj se estas „lukse", oni ricevas ĉiutage du „tortillas". Faboj, propradire la ĉef-nutraĵo de la indianoj, estas ĉi tie de longe ne plu akirebla lukso. Kaj eble unu fojon jare oni manĝas viandon.

Tiuj indianoj iam estis fiera raso, kiu heredigis al Meksikio belegajn fabelojn kaj legendojn, mirindajn dancojn kaj kolorriĉan vestaĵon. Sed tiu belegaĵo longe forvaporiĝis. Jarcentoj da ekspluatado kaj apartigo sufokis tiun tradicion.

La registaro, kreinte „Indianan Instituton" klopodas nun plibonigi la vivkondiĉojn de l' meksikiaj indianoj. Sed la rimedoj estas nesufiĉaj. La jara buĝeto sumiĝas je unu miliono da dolaroj. Per tiu sumo oni devas tra la tuta lando konstrui lernejojn por la indianoj kaj ilin prizorgadi. Precipe devas esti pagataj instruistoj, kiuj instruas la hispanan lingvon al la indiĝenoj. Ankaŭ por materia plibonigo devas esti utiligata tiu mono.

Temo ankoraŭ aktuala!

En tiu malnova Esperanta gazeto „La Revuo", internacia monata literatura gazeto, en kiu kunlaboris konstante d-ro Zamenhof, aperis, en la maja n-ro de la jaro 1913, alvoko al la publika opinio por la forigo de la kurludoj de bovoviroj. „Ekzistas trans la Pireneoj kontraŭ-toreadora ligo," tekstas en tiu Alvoko, „enhavanta milojn da anoj. Ĉiujare tiu ligo postulas la forigon de tiuj sangaj bataloj aŭ almenaŭ la malpermeson al la junuloj malpli ol dudekjaraj kaj al la virinoj, kiaj estas ilia aĝo, aktive partopreni en tiu sovaĝa ludo. La bruteco kaj krueleco de tiuj plezuroj estas hontindaĵo por la civilizita Eŭropo. Sed la fervorego al tiu sporto estas tiel enradikigita en la popolon, ke la registaro ne kuraĝas enmiksiĝi. Estas afero de la publika internacia opinio vidigi per stariĝo de ligo aŭ per iu alia pero tian malaprobon, ke la hispana opinio estos ŝancelita, kaj fine konsentos pri la forigo de tiuj bataloj."

De tiu alvoko pasis 53 jaroj, pli ol duona jarcento...... Sed ĉu okazis ia ŝanĝo sur tiu tereno? Plue prosperas tiuj taŭroludoj en la regno de Franko — kial do li malpermesu tiun „distron" amuzantan la popolon...... — kaj ili okazas eĉ en kelkaj urboj sudfranciaj...... La bestprotektaj societoj staras kontraŭ longjara tradicio. Espereble iun tagon ili venkos super la sovaĝula instinkto.



Junulara angulo

S.A.T.-anoj, junaj aŭ ne, legu „L.J.P." !

Nun 16-paĝa, regule aperanta, la dumonata gazeto de SAT-Junulfako, „La Juna Penso", meritus, ke, krom la laborista junularo, ankaŭ la SAT-barbularo dediĉu al ĝi iom da atento kaj — por plej konkrete helpi ĝin — simple konsentu aboni ĝin.

Ĉu eble oni opinias, ke junulara gazeto povas interesi nur gejunulojn? Se jes, oni eraras...... Pruve, en la julia n-ro de LJP vi povos legi, krom la raporton de la junulfakaj respondeculoj por 1965/66, viglajn debatojn pri „Aŭtostopo" kaj „Familia Planado", poezipaĝon de k-do Burger, fantaziaĵon de Goho „Streĉu la alarmsignalon!", la rubrikojn „Kontraŭ la dogmoj" kaj „Por la Paco", „El nia leterkesto", ktp... sen forgesi la kutiman paĝon „Ludu kun ni!" kun ŝakoj, krucvortoj kaj la ŝerckonkurso „Ĉu vi scias?"

Kompreneble, LJP bezonas nek mecenatojn, nek almozpeti. Ĝi simple bezonas abonantojn.

Kiu, pli ol la SAT-anaro mem, povas interesiĝi pri la gazeto de la SAT-junularo?

Ni sufiĉe tedis vian paciencon. Cetere, ŝajnas, ke vi konas la respondon... kaj konsekvence, la plej bonan manieron pruvi al ni, ke vi komprenis tiun alvokon. Tamen, ni povas flustre aldoni ion, de buŝo al orelo: „Se vi abonos LJP-on **nun** por la jaro 1967, vi senpage ricevos la 2 lastajn n-rojn de 1966!"

Ĉu ne profitenda okazo?

La Junulfako

Jarabono al LJP:

1/3 de SAT-kotizo al:
„La Juna Penso" - 21, rue Matignon
33. BORDEAUX. Francio
Poŝtkonto 337404 Bordeaux
aŭ al via landa peranto.

F.L.E. kongresis en Gento

Tre bone organizita de la gek-doj en Gento, Belgio, estis la 45. F.L.E.-kongreso, kiu okazis 26-27. marto en la Popoldomo de tiu urbo, kie en 1961 kongresis SAT. Kelkaj oficialuloj, el belga sindikata centro, socialista partio, skabeno por instruado, parolis en vespera kunveno. Muziko de Braille-kvarteto kaj skeĉo en Esp. plenigis tiun vesperon. Kelkaj Kongo-anoj (esp. lernantoj de Bruselo) sin prezentis sur la scenejo. „Volksgazet" (Antverpeno) raportis la 29.3. objektive pri la kongreso.

Venontjare la kongreso de FLE okazos en Utreĥto.

Prezoj en Argentinio

Prezoj primokis ĝis nun registar-ordonojn kaj kontrolojn. Por moderigi la plialtigojn, restas surpiede nur senefikaj kaj nekapablaj ŝtatoficistaj organizoj kaj inspektoroj, kiuj ŝveligas la burokrataron ĵus vipkritikitan de la Nacidefenda ministro.

Kio okazos nun al la Ekonomiministra projekto por atingi ĝeneralan malkariĝon? La plano konsistas el elimino de negativa komercperado per kunlaboro de sindikataj korporacioj, mutualaj societoj kaj kooperativoj, kun celo senpere aĉeti al la produktantoj la plej bezonatajn varojn. Ĝi estos aliflanke pli profunde ekzamenata dum la venonta kunsido de la sociekonomia ministraro.

Estas tamen malfacile rilatigi ĉi tiujn oficialajn aspirojn al kelkaj onidiroj, laŭ kiuj venontsemajne estus rajtigataj prezaltigoj, kiuj tuŝas la popolbuĝeton. Temas pri novaj prezoj por lakto kaj por hejma gaso. La aktualaj prezoj por lakto, 17,50 pesoj por litro kontore, kaj 19 pesoj ĉe kliento, plialtiĝus je 19.50 kaj 21 respektive. Tio estus eble la unua fojo, kiam lakto prez-altiĝas dumsomere. Tio plej ofte okazas vintre, kiam lakto malabundas.

Tiuj prezoj estis proponitaj al la registaro antaŭ iom da tempo, kaj oni ne povas atribui ilin al la plialtigo de la prezoj por petrolo kaj transporto. Tiuj prezoj sendube konsistigos alian faktoron por malfaciligi la familian pluvivadon, precipe se ni konsideras, ke ili ne estos la lastaj, nek stabilaj.

Ankaŭ baldaŭ ekaperos la tarifoj por naturgasa konsumo, tube aŭ karafe. Industrigaso jam antaŭ nelonge plikariĝis je 20%. Ŝtata gaskompanio projektis eĉ pli grandan prezaltigon por naturgaso, sed ankoraŭ ne akiris la konsenton de Energi-sekretario.

Kelkaj kronikistoj komentis, ke tio povas okazi pro politika diverĝado inter oficistoj de Energi-sekretario kaj Ŝtata gaskompanio, — tio estas, ne nur pro peto de tro granda prezaltigo de l' Ŝtata gaskompanio.

Krom tio, la postfebruaraj fervojaj tarifoj faras zorgon al la uzantoj, komercistoj kaj industriistoj.

Dume ni vidas la optimisman kaj admonan televid-komentiston — kaj kompreneble ĝian tekstverkanton — daŭre kaj senkompate montranta per sia fingro al la sendefenda publiko, memoriganta samtempe ke jam antaŭ multe da tempo la registaro anoncis 12% da prezaltigo. Do, kial surpriziĝi?

Ĉio estas ebla: eĉ permesi plialtigon de la kostoj por poste stabiligi ilin sur la bazo de tiu plialtigo. Jam delonge ja multe da vortoj kaj rezonadoj estas senutilaj en tiu ĉi mondo.

Trad. el „La Capital" (18. jan. 66, *Rosario)*
Ruben Feldman Gonzalez (31.168).

La proksima numero aperos komence de septembro.

MEMOROJ EL MIA JUNAĜO

Dum la periodo kiam la majskaraboj aperis, ni preskaŭ ĉiun tagon skuis al niaj heĝoj, kaj kiam elfalis aŭ forflugis tiuj insektoj, ni ĉiuj kuris por kapti ilin la unuaj. Ni posedis grandan skatolon plenan de tiuj bestoj; ni ankaŭ enmetis kelkajn foliojn, por ke ili ne malsatu, kaj ni ŝanĝis la insektojn kontraŭ aliaj ludiloj.

Mi ankaŭ tre ŝatis helpi mian patrinon, same en la kuirejo kiel sur la kampo. Iun tagon, dum miaj fratoj ludis ie, mi denove helpis sur la kampo, kaj dum mia patrino elhakis terpomojn, mi kolektis ilin en sitelon. La hakilo konsistis el longa ligna tenilo kun kvar longaj akraj dentoj el fero, sufiĉe peza. Kiam mia patrino havis sufiĉe da terpomoj, ŝi returne iris al la domo por pretigi kelkajn por la tagmanĝo. Ŝi lasis la hakilon sur la kampo kaj diris, ke ŝi baldaŭ revenos. Mi do atendis surloke. Sed tiu atendado tro longe daŭris laŭ mia gusto, kaj mi senpacience mem volis elhaki kelkajn terpomojn; sed ......hakante mi traboris per unu dento mian dekstran nudan piedon. Laŭte hurlante mi ekkriis: „Panjo! Panjo!", kaj, vidante iomete da sango, mi ankoraŭ pli laŭte ĝemis, pensante ke mia animo elvenas. Tuj alkuris mia patrino; ŝi ankoraŭ pli multe ploris ol mi kaj portis min en la domon, kie ŝi kuŝigis min sur tri seĝoj, lavis mian piedon kaj bone flegis ĝin, por ke mia patro nenion vidu aŭ sciu pri tio!

Foje en tagmezo oni aŭdis muzikon en la malproksimo. Mia patrino ĵus elŝovelis niajn terpomojn kun ruĝaj brasikoj. La fratoj tuj forkuris por rigardi kaj pli bone aŭdi sur la ŝoseo, kaj ili lasis ĉion sur la tablo. Mi ankaŭ forkuris, sed kunprenis mian teleron, ĉar mi tre ŝatis la de mia patrino pretigitajn ruĝajn brasikojn (evidente, kiel preskaŭ ĉiam...... sen viando). Estis la nova katolika vilaĝestro Goethals, granda kastelposedanto, kiun oni tiel bonvenigis. Kiam la sekvantaro envenis la vilaĝon, oni tuj komencis muziki.

Preterpasantoj kaj ĉirkaŭantoj kurioze rigardis kaj ekridis al mi; sed mi, nenion komprenante, kviete manĝis miajn ruĝajn brasikojn. Ĉiuj diris: „Estas Georĉio de Maria de Rietjes, al kiu la nova vilaĝestro tiele rigardis".

Mi jam insistis ke oni ne honorigu tiujn fiulojn per nia ĉeesto. Tiutempe mi ankoraŭ estis sensperta, kaj mi agis kiel la plej granda parto de stultuloj, nome kiel hundo, kiu lekas la manon de la frapinta majstro. Sed bonvolu pardoni: dum mia junaĝo ne ekzistis multaj apostoloj por klaskonsciigi la gelaboristojn.

Kaj nun por konkludi: laŭ mi oni devas honori nur tiujn apostolojn, kiuj restis fidelaj al siaj principoj kaj restis simplaj soldatoj en la vicoj, el kiuj ili devenas. Ĉar granda estas la egoismo de la homoj; kiam ili fariĝas potencaj, ili forgesas sian pli fruan mizeron kaj misuzas sian potencon. Do, por ne erari, sole honoron al la simplaj soldatoj post ilia morto, ĉar vivante ili ankoraŭ povus turni al ni la dorson. La ideala homo ĝis nun ne estas kreita, kaj la plej bona devas esti bridtenata per leĝo, kiu ĝis nun neniel ekzistas.

Bonvolu relegi tiujn lastajn frazojn por ilin bone teni en la kapo! *SATano 8097.*

Pasero

Ni revenis de ĉaso kaj paŝis sur ĝardena aleo. La hundo kuris en la antaŭo. Subite ĝi pli malgrandiĝis, ĝi komencis paŝete ŝteliri, kvazaŭ ekflaris ion antaŭ si...... ĉasaĵon. Mi ekrigardis laŭlonge de la aleo kaj ekvidis junan paseron flavkoloran flanke de la beko kaj kun lanugo sur la kapo. Ĝi estis falinta el nesto, kiam la vento forte balancis la betulojn de l' aleo, kaj sidis senmova, senpova, apenaŭ disetendante la flugiletojn. Mia hundo malrapide proksimiĝis al ĝi kaj subite, elglitinte de apuda arbo, maljuna nigrabrusta birdino, simile al ŝtono, ekfalis antaŭ la buŝegon de l' hundo, kaj tute hirtigita, kun rigardo malbela pro teruro, kun ekkrieto de kuraĝulino, eksaltis dufoje en direkto al buŝego plena de akraj dentoj.

Ŝi sin ĵetis tiele, por savi, por ŝirmi per sia korpeto sian infanon...... sed ŝia tuta malgranda korpo tremetis pro teruro la voĉeto sonis sovaĝe kaj raŭke; ŝi sin oferis!

Kia grandega monstro ŝajnis al ŝi la hundo! Sed ŝi ne povus resti sidanta sur sia alta eksterdanĝera branĉeto. Forto pli potenca ol ŝia volo, ol ŝia instinkto de memkonservo, deĵetis ŝin de tie. Mia „Trezoro" (tiel nomiĝis mia hundo) ekhaltis, retiriĝis. Videble li ankaŭ havis saman opinion pri rajtoj de birdpatrino, ŝia forta patrin-instinkto, ŝia forta patrina amo.

Mi rapidis revoki la konfuzitan hundon kaj malproksimiĝis respektplena. Jes, vi ne ridu: mi sentis respekton por tiu malgranda heroa birdo, por ĝia amplena patrin-impulso. Amo, mi pensis, estas pli potenca ol morto kaj pli forta ol timo antaŭ morto. Nur per **amo** konserviĝas **vivo.**

I. S. Turgenev. Tradukis Zinaida L. Söderberg
(antaŭa Agranovskaja).

SENNACIECA REVUO 1966
aperis! Kiu ankoraŭ ne mendis, povas ĝin ricevi laŭ la prezo indikita en „Sennaciulo" okt. kaj dec. 1965 (tarifoj). Meza prezo: 0.90 $ *Riĉe ilustrita kajero!* Multaj originalaj kontribuoj.
SAT-Paris.

„Privataj" lagoj en Kanadio

En vastega Kanadio troviĝas ĉirkaŭ unu miliono da lagoj. La sola provinco Ontario posedas el ili ĉirkaŭ 250.000.

Multaj lagoj situas en malproksima nordo, kie nur malmultaj homoj loĝas kaj kie mankas vojoj. Sed ankaŭ granda nombro situas en la suda parto de la lando, kie loĝas multaj homoj kaj kie abundas bonegaj vojoj.

Nur malgrandaj lagetoj estas privata propraĵo; aliaj, grandaj kaj mezgrandaj, apartenas al „la krono", tio estas al la provincaj registaroj. La akvoj estas publikaj, sed ne la bordoj. Ĉi tiuj jam estas tute „disgratitaj".

La provincaj registaroj jam forvendis mallarĝajn zonojn laŭlonge de la bordoj. Ili vendis tiujn striojn eĉ malmultekoste, sed kun kondiĉoj, ke sur la bordo devas aperi bela dometo kaj ĝi devas esti en bona stato kaj loĝata almenaŭ somere.

Nu, tion povas fari nur persono, kiu havas monon por konstrui dometon kaj tempon por loĝi en ĝi somere, aŭ kiu povas sendi tien la edzinon kaj infanojn. **Estas tute malpermesate trairi la privatan posedaĵon.** Oni povas loĝi tre proksime de belega lago, tamen ne havi rajton tie malsekigi siajn piedojn. Eĉ la farmistoj el proksimaj bienoj ne rajtas ĉerpi la akvon, se ili ne proprumas la bordon. Iliaj bovinoj povas morti de soifo.

Kompreneble, kie estas **privataj** dometoj, tie estas ankaŭ **publikaj** vojoj por aŭtomobiloj. La vojojn konstruigis provincaj registaroj per impostoj de ĉiuj (ankaŭ la mia). Por la publiko restis malmulto. Se ie estas publika strando, oni nomas ĝin „parko". Tiuj „parkoj" ne abundas. En ili fetoras aŭtomobiloj, kaj korpo kuŝas apud korpo. Kompreneble ekzistas necesejoj, gardistoj kaj vendistoj de „koka-kola"-o, de bulkoj kun kolbaso, kiujn lastajn oni nomas „varmegaj hundoj" (angle: „Hot Dogs").

Apud la publikaj strandoj oni naĝas, oni uzas ŝipetojn aŭ barkojn, oni fiŝkaptas ktp. Sed oni tute ne rajtas albordiĝi al privata bordo. Estas organizataj perŝipaj ekskursoj. Ekzemple en Ontario estas famaj: „Muskoka Lagaro", „30.000 insuloj" kaj aliaj. Oni vidas malaltajn aŭ altajn, rokoplenajn bordojn. Ĉie estas arboj kaj belaj dometoj. Sed tio estas „malpermesita lando" por publiko. En „Muskoka Lagaro" troviĝas „milionula angulo", kie somere loĝas usonaj milionuloj.

Ekzistas ankaŭ specialaj parkoj por loĝi. Oni devas posedi propran tendon kaj aŭtomobilon, ĉar neniu kapablus porti pezan tendon. Oni devas pagi por la loko. Sed en parko estas akvo por trinki, necesejoj, telefona budeto, eĉ vendbutiketo. En kelkaj parkoj oni trovas lignon, se iu ŝatus kuiri sur primitiva fajrujo.

Dum kongreso de Kanada Esperanto-Asocio en Kebeklo (1965) okazis ekskurso al lago de „Sankta Jozefo". Oni naĝis, oni ludis sur barkoj, ktp, sed nur dank' al bonkoreco de unu geedza paro, kiu posedas dometon kaj peceton de la bordo. Ilia razeno devis sufiĉi por ĉiuj gekongresanoj.

Kompreneble, simile statas en Toronto. Por la publiko restis nur malmulte. La homoj povas iri al la dense okupita strando en la urbo aŭ al Toronto-insulo. Feliĉe ĝis nun oni povas iri tien nur per ŝipo. Sur la insulo oni povas ankaŭ lupreni malnovajn biciklaĉojn kaj sekure bicikli tra la vojetoj, ĉar nur polico uzas aŭtomobilon. Sed la urbestraro intencas konstrui ponton aŭ tunelon; tiam aŭtomobiloj invados kaj fetorigos la aeron.

Nu, eĉ someraj plezuroj estas malfacile atingeblaj por homoj, kiuj perlaboras malmulte.

Vl. Zigmuntoviĉ, (28.615), Toronto.

Klareco kaj precizeco de la lingvo

Ni proponas Esperanton kiel komunan helplingvon por ĉiuj homoj. Ni asertas, ke Esperanto estas relative facila kaj ebligas precizan esprimon de ĉiu penso. Mi tute konsentas pri tio, sed mi opinias, ke por faciligi nian varbagadon, nian propagadon (ĉefe en ekstereŭropaj landoj), kaj konservi la varbitajn anojn, ni devas uzi kiel eble plej simplan, klaran lingvon, almenaŭ en la ordinaraj, ĉiutagaj rilatoj.

Mi konsentas pri uzo de neologismoj, kiam ili estas nepre necesaj, ekzemple pri sciencaj kaj teknikaj temoj (cetere la novaj terminoj estas ofte internaciaj kaj postulas nur Esperantan „vestadon"); sed aliajn, nenecesajn neologismojn ni rezervu por beletraj, poeziaj verkoj (tiaj ne estas ĉiam facile kompreneblaj, eĉ en nia nacia lingvo, do...); ekzemple, mi ne trovas utila la anstataŭigon de la vortoj faritaj per „mal", per novaj vortoj, dum multaj lingvoj posedas esprimojn formitajn laŭ la sama sistemo...: ĉu ni ne havas en la franca lingvo: „heureux — malheureux", en la angla: „happy — unhappy", en la germana: „glücklich — unglücklich", en la itala: „felice — infelice"... ktp? Forlasi tiun eblecon de vortformado estus senprofite kompliki Esperanton, malfortigi nian argumentadon pri simpleco de nia lingvo kompare kun la aliaj!

Mi konstatas tendencon — sendube pro nacilingva influo — uzi vorton por esprimi du malsamajn signifojn, malgraŭ ke Esperanto proponas la necesajn du terminojn: ekzemple, ni ĉiutage legas „permesi", uzita kun la scenco „ebligi", kaj tiu lasta vorto preskaŭ malaperas el niaj tekstoj. Mi preferus, ke oni uzi „permesi" kiam temas pri... „permeso", sed ne kiam temas pri „ebleco". Kial forlasi eblan precizecon? Se tiu senzorga tendenco plidaŭras, oni certe povos iam riproĉi al Esperanto, ke ĝi ne estas tiel preciza, kiel iu aŭ alia nacia lingvo, pri iu aŭ alia punkto.

Mi ankaŭ konstatas ofte, ke la senco de kunmetita vorto estas duba, pro simileco al vortara termino, aŭ pro ebleco ĝin diversmanire dispartigi: ekz.

konk-ludo, kaj konkludo
mono-logo, kaj monologo
lim-baro, kaj limb-aro..., (kaj tio ebligas spritajn vortludojn, ĉu ne, Ŝvarc!)

Sed, por eviti eventualajn miskomprenojn, iu proponis, en la dubaj kazoj, apartigi la radikojn de la kunmetitaj vortoj per streketo (kiel mi ĵus faris en ĉisupraj ekzemploj); ŝajnas al mi, ke tio estus praktika rimedo klarigi niajn tekstojn kaj faciligi ties komprenon, ĉefe de la novbakitaj esperantistoj.

Oni komprenu, ke mi ne intencas malhelpi la evoluadon de nia lingvo; sed oni komprenu ankaŭ, ke, ĝis ni estos pli certe venkintaj, ni devas konservi ĝian „Zamenhofan" simplecon, eviti ĉian senutilan komplikadon, kiu malfaciligus nian propagandon en tempo, kiam ĝi ne estas facila pro diversaj kaŭzoj: disvastigo de la angla lingvo, progreso de la tradukmaŝinoj, diverseco de la eblaj distraĵoj (televido, aŭto, ktp.).

SKELDIDO (29328)

Unua Festivalo de Junul-Domoj

organizata de la Franca Federacio de Junuldomoj okazos en **Narbono** (mediteranea regiono de Francio) de 11.-24. julio. Aĝo de partoprenantoj: 18-25 j. Gastigado, partopreno al la div. aranĝoj, ekskursoj, spektakloj ktp. entute 30 Fr. Esp. propagando estos farata en tiu manifestacio. Pliajn informojn donas: Maison des Jeunes", **11 Narbonne,** Francio.

Por pliampleksigo de „Sennaciulo"

Ni danke kvitancas jenajn novajn donacojn:

— en *Parizo:* (Fr) Najlokunveno Duseldorfo 33.52 (27.25 mk), memore K.E. 19.64, Renault 3.-, Kotro 5.-, Pasquier 2.- (sume: Fr 63.16)
— en *Stokholmo:* (skr) Malte Carlsson 10.-
— en *Roterdamo:* (gd) Minke 0.25, Kraefft 1.25, G. Veen 0.75 (= gd 2.25)

La tuto de la listo simiĝas je dol 15,19.

Pacista Frakcio

Aŭtoritata sciigo

„Oni nepre devas diri kaj insiste rememorigi al la popoloj ke, por ilin starigi unujn kontraŭ la aliajn, oni ilin senĉese trompadis" — (Generalo PERCIN).

Fakte, kvazaŭ tiucele stariĝis „P.F." en S.A.T., kies unua paragrafo en la Regularo tekstas jene: „studi, malkovri kaj disfamigi la kialojn de la milito"..., el kiuj la ĉefa nedubeble estas la perfida mensogo, nepre malkaŝenda por konfuzi la cinikajn trompulojn, kiuj ĝin senhonte uzas ĉiutage por sendi la homojn, kiel ŝafojn, al la buĉado!

Tio, kio cetere donos temon al la debato pri: „Porpaca farinda kaj farebla laboro", de mi proponata al nia dumkongresa P.F.-kunsido en Swanwick, kaj al kiu estas, kompreneble, invitata partopreni grandnombre la S.A.T.pacistanaro. Kamaradece

ROFO.

MEMORNOTO

Je la 17a de majo tute neatendite mortis en Roterdamo, en aĝo de 55 jaroj, nia kamarado

ANTON VOLLEGRAAF (matr. 18.093).

Lia morto estas grava bato por nia tuta movado.

Antaŭ pli ol 30 jaroj k-do Vollegraaf lernis nian lingvon, entuziasme aliĝis nian movadon kaj jam baldaŭ fariĝis estrarano de la tiam ankoraŭ juna sekcio Roterdamo 2a de F.L.E.. De tiam li ĝis la lasta vivotago fidele servis nian movadon en ĉiaj funkcioj, ne nur en la propra sekcio, sed ankaŭ en la roterdama distrikto kaj konsilantaro de F.L.E.. Li reprezentis F.L.E. en la kunlaborkomitato de la diversaj Esp.-organizoj en Roterdamo, kie li ĉiam estis fidela kaj fidinda defendanto de niaj principoj.

Tre multaj SAT-anoj memoros lin, ne nur el la SAT-kongresoj, kiujn li ĉeestis, sed precipe el nia 30a kongreso, 1957, en Roterdamo, kiam li okupis gravan lokon en la O.K.K. kaj i.a. perfekte aranĝis la ekskursojn. Krome li faris gravan laboron por SAT, ĉar li plenumis grandan parton de la ekspedlaboro por *Sennaciulo* kaj i.a. ankaŭ prizorgis la ekspedon de la SAT-libroj el Roterdamo.

SAT perdis en li fidelan kamaradon, entuziasman laboranton kaj ĉiam fidindan defendanton de niaj ideoj. La breĉo, kiun faris lia morto en niaj vicoj, estos nur malfacile ŝtopebla. Al liaj edzino kaj infanoj ni esprimas niajn plej sincerajn kondolencesprimojn.
v.E.

La 2-an de majo mortis en Bielefeld, Germanio, en sia 80-a jaro, post plurjara malsano,

K-dino Barbara v. d. HEID (matr. 13.362)

edzino de nia kara k-do Alfredo. Ĝis la morto ŝi restis fidela al nia afero. Pro sia bonkoreco kaj, aparte, modesteco ŝi havis la simpation de ni ĉiuj. Kun alta estimo ni ĉiam memoros pri ŝi. Elkoran kondolon al Alfredo al filo kaj familianoj.

Por E-Ligo de Bielefeld (W. Mühlenweg)

En Karlsruhe, Germ., mortis la 11-an de majo, en aĝo de 81 jaroj

K-do Friedrich DORNER (matr. 24.417)

jam malsana dum la lastjara SAT-kongreso.

Ni kondolencas sincere al lia filo Hans, ankaŭ membro de nia Asocio.

En Munkeno, Germanio, mortis la 23. aprilo, en aĝo de 71 jaroj, pro kor-apopleksio,

K-do Konrad DEUBLER (matrikulo 30).

Li partoprenis la fondkongreson de SAT, 1921, en Praha, kaj multajn jarojn elstare aktivis en la SAT-kaj LEA-movado; longajn jarojn li redaktis „Arbeiter-Esperantist" kun granda lerto. Ankoraŭ en Vieno (1962) ni vidis lin ĉe SAT-kongreso.

En Munkeno ankaŭ mortis, laŭ informo de la Poŝto,

K-do Michael SKALSKY (matr. 9.762)

kiu jardekojn restis fidela ano de nia Asocio (li aliĝis en 1925).

La 24. aprilo mortis subite, en aĝo de 84 jaroj, en Schriesheim, Germanujo,

K-do Adam HUND (matr. 24.442).

Li ĝismorte estis fidela kaj aktiva ano de la grupo Hejdelbergo, partoprenis multnombrajn E-kongresojn (ĉe multaj SAT-kongresoj ni renkontis lin) kaj ĉiam spicis per sia ĉarma humoro la kunvenojn.

En Dayton, Ohio, Usono mortis, 91-jara,

K-do Fred SCHULDER (matr. 24.068)

longjara membro de nia Asocio.

En la Sermone (Le Puy), Francio, mortis

K-do Elie BRIOUDE (matr. 28.911).

En Vendôme, Francio, mortis en aĝo de nur 40 jaroj

K-do Jean AUGER (matr. 31.128).

En Antwerpen, Belgio, mortis la 13.majo, 77-jara,

K-do E. WILLEKENS (matr. 22.623)

kiu estis, en 1921, kunfondinto de la unua Socialista E-Grupo en Antverpeno, „Nia Ideo", kiu en 1929 aliĝis al F.L.E. Dum multaj jaroj prezidanto de distrikto Flandrio de tiu LEA kaj de la loka FLE-grupo, li ankaŭ gvidis E-kurson ĉe la Popol-altlernejo Em. Vandervelde en Antverpeno. Kiuj konis lin, esperantisto de pli ol 50 jaroj kaj fidela SAT-ano, memoros pri kunbatalanto kiu ĉiam instigis al lingva perfektigo de l' esp. laboristoj. Per tiu strebado ni plej bone honoros lin.
Stella.

En Bruselo-Anderleĥto mortis la 30. majo

K-do Joseph BRACOPS (SAT-ano n-o 1999)

urbestro kaj parlamentano socialista, 66-jara. Honorprezidanto de la brusela SAT-Amikara grupo, li promesis honorprezidi la 22-an kongreson de SAT-Amikaro en sia komunumo Anderleĥto, paske 1967, preta senrezerve helpi al ties sukcesigo. Sur sindikata kaj politika kampo li sindoneme batalis dum 45 jaroj por socialismo. Tiel li konis dum pr. tri jaroj la inferon de pluraj naziaj ekstermejoj; la usonaj armeoj liberigis lin en julio 1945. Lia sano estis jam grave kompromitita. Funebras kaj dankeme omaĝas SAT-anoj kaj amikaranoj el Bruselo (M.V.A.)

En Lausanne, Svisio, mortis 79-jara

K-do Alfred THONNEY (matr. 29.934)

kiu fondis en decembro 1919 la Labor. Esp. Grupon „Zamenhof" en Lozano kaj ĝis vivofino restis fidela al la movado.

En Huddersfield, Britio, mortis malnova ano

K-do B. B. BEAUMONT (matr. 10.081)

en aĝo de 66 jaroj, je 27. aprilo.

De 1-17. aŭgusto la Studenta Tutmonda Esp. Ligo (STELO) okazigos sian unuan kongreson en Ruse, Bulgario. Adr.: Komsomolska 8 S.E.K., *Ruse*. Okcidentlandanoj pagos al: *Claude Nourmont*, 3 av. d' Indochine, *13 Aix-en-Provence*, Francio, (200 steloj por membroj, 230 por nemembroj); poŝtkonto M. Nourmont Guy, MARSEILLE 393151.

La grupo Verviers organizis tre bone la „Trilandan Esp. Renkontiĝon" je 24. aprilo en *Spa* (Belgio). Ĉeestis 80 personoj. Nederl. kaj germ. delegitoj salutparolis; okazis laborkunsido kaj akcepto en la urbdomo kun honorvino. Komuna tagmanĝo; lumbild-prezento pri Tokio (R. Demarche); parolado de D-ro Denoel el Lieĝo. pri la aktuala lingva ĥaoso.
(P.F.)



Ni kvitancas dankeme jenajn donacojn al la Servo:

— en *Parizo:* (Fr) Hardy 3.50
— en *Stokholmo:* (skr) 35.- Huskvarna E-Klubo (por 2 senlaborulabonoj)

Sumo de la listo: dol. 7,45



— K-ino *Nina Tupolskaja*, ul. Opanskogo 96-e, kv. 2, *Minsk-48*, Sovetio, 23-jara, interŝ. bildk.

— K-do *Viktor Paveljev*, 35-j. inĝen., ul. Opanskogo 96-a, kv 23, *Minsk-48*, Sov. interŝ. bildk., PM.

— K-do *Boris Ĉeĉetko*, 29-j. aspiranto, ul. Internacionalnaja 31. kv. 10, *Minsk-30*, pri sennaciismo, mondfederismo, polit., ekon., sociologio.

— Kun interesuloj pri bio-dinamikaj kolektivoj serĉas korespond-kontakton *Harry v. Kortsen*, Grunför Mark, *Hinnerup*, Danio.

Naciismo Nepravigebla

La fama brita verkisto J. B. Priestley **(New Statesman,** feb. 25/66) elokvente kaj efektive atakis naciismon, kiu laŭ li estas falsa kiel plastika floraro. Kontraste al ĝi la veraj naturaj floroj estas regionismo, kie la homo havas siajn radikojn, kun amikoj kaj feliĉaj memoroj. Nacion kreas nur la politikistoj dezitantaj potencon kaj personan prestiĝon. La moderna mondo ne bezonas pliajn naciojn.

En internaciismo li distingas inter la monopolistoj kaj financetsroj internaciaj kaj la sciencistoj kaj kuracistoj, kiuj per specialaj organizoj de UNO, en sano, nutrado, edukado, produktado k.a. fakte kreas mondcivilizacion, dum la nacioj nur sinlaŭdas. Naciismo nun penas heltigi la kreskon de tiu mondskala vidpunkto kaj ŝovinisme atakas kaj rifuzas kunlaboradi. Ĉiu granda nacio opinias, ke ĝi pleje taŭgas por esti mondreganto. Ĉiu nacio malhelpas internacian interŝanĝon de personoj kaj ideoj per impostoj, pasportoj, vizoj, laborpermesoj ktp.

Spite de ĉio kreskas mondkooperado kaj homa reciproka interkompreno. Naciismo, diris tiu brita aŭtoro, estas la putra viando inter du sanaj panpecoj de regionismo kaj vera internaciismo. „Dum la regiona homo riĉigas done kaj riceve la homvivojn, kiujn la vera internaciisto jam klopodas sekurigi kaj sanigi, la nacia homo, ebria de mempotenco, postulaĉas nian lojalecon, monon kaj aplaŭdon kaj venenas eĉ la aeron per siaj danĝeraj sensencaĵoj."

Ĉu ni povas rekruti S-ron Priestley al SAT kaj montri, ke la internacia lingvo helpas la regionojn eviti la subpremon de la lingvaj bigotoj kaj kulturkoloniistoj, kiuj diras „Lernu kaj parolu angle"?

— — —

Notoj.-Usonanoj en j. 1964 elspezis 7,6 miliardojn da dolaroj por hospitalzorgado kaj 7,8 miliardojn por tabakaĵoj. El 1000 teranoj 60 estas usonanoj, sed ili ricevas la duonon de la tuta monenspezo kaj atendas vivi dum 70 jaroj, sed multaj aliaj popolanoj meze povas esperi vivdaŭron de nur 40 jaroj.
488

Preso: Drukkerij v.h. Dekker - Hardinxveld-Giessendam - Nederlando

al
J. Bernabeu Franco,
Calle San Martin, 10
Callosa de Segura, Alicante

65 pes. julio - dec. 66
130 pes tuta jaro

ALIĜ-DEKLARO

Leginte la dorspaĝe presitan ekstrakton el la statuto de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (S.A.T.), kompreninte kaj aprobinte la celon de tiu ĉi Asocio, mi (*nomo kaj kompleta adreso per klare legeblaj literoj*)

....

....

Naskiĝ-jaro: .... Profesio : ....

esprimas la deziron aliĝi kiel aktiva membro al S.A.T. kaj promesas subteni laŭ mia povo ĝian agadon kaj konduti konforme al la spirito kaj teksto de ĝia regularo.

Dato: .... Subskribo: ....

Ekstrakto el la Statuto de S.A.T.

CELO

1. Sub la nomo *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT) estas fondita Asocio, kiu celas: *a*) utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda; *b*) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de Homeca solidaro; *c*) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj; *ĉ*) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT; *d*) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la *dogmiĝon* de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

Membreco

2. Ekzistas 2 kategorioj da membroj: aktiva kaj subtenanta.

3. Povas esti aktiva membro ĉiu persono, scipovanta esperanton, kiu, akceptinte ĉi tiun statuton, pagas la jarkotizon, ĉiujare fiksitan de la Plenum-Komitato (P.K.).

4. Aktivaj membroj rajtas: *A*) ricevi la Jarlibron kaj la oficialan organon de la Asocio, — *B*) partopreni en ĉiu referendumo, — *C*) voĉdoni en la Kongresoj. — *Ĉ*) uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio. Aktivaj membroj do povas influi la gvidadon de la Asocio; ili havas la devon ĉiel laŭpove helpi al la progresado kaj bona funkciado de la Asocio.

La samfamiliano(j) de aktiva membro povas ĝui la samajn rajtojn kiel ĉi tiu lasta, pagante nur la duonan kotizosumon. Tiaj membroj tamen ne ricevas apartan ekz-on de la oficiala organo.

....

Servoj

24. La servoj de la Asocio estas rezervataj al ĝiaj membroj aktivaj, kaj subtenantaj.

25. Principe la membroj aktivaj devas doni senpage informon kaj helpon pri vojaĝo, enketo ktp., al ĉiu membro, kiu sin turnas al ili. Ili havas la devon respondi ĉiun laŭregulan informpeton de alia membro, en templimo de 15 tagoj, eĉ se ili havas nenian kompetenton por plenumi la deziron de la petanto. Tamen ili rajtas ne respondi al petanto se: *A*) la letero ne estas redaktita esperantlingve, — *B*) la peto havas karakteron konfidencan aŭ ofendan, — *C*) la afero postulas elspezojn, ekzemple se responda afranko ne estas aldonita, — *Ĉ*) la membronumero ne estas indikata.

26. Resume: ĉies devo estu tia, ke la Asocio fariĝu kvazaŭ tutmonda retaro, kies maŝoj estas solidaraj inter si, kaj ke ĉiu trovu en alia membro la plej bonan kaj la plej certan peranton por vojaĝo, dungiĝo, informo, enketo, serĉoj, ktp.

La membroj firme konvinkiĝu kaj neniam forgesu, ke ilia aparteno al SAT donas al ili ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn: la Asocio ja havas praktikan kaj idealan celon, ĉies devo estu do memedukiĝi por fariĝi ĉiurilate inda batalanto laboranta efike al starigo kaj prosperigo de senklaseca kaj senekspluateca socio.